legado influos kelkajn el niaj spertaj aŭtoroj ke ili faru delikatajn konstruaĵojn, anstataŭ piramidojn. Krom la Fundamento mem "Esperanta Vortfarado" estas unu el la plej gravaj lernolibroj kaj ĝia uzado kaj studado influos nian estontan literaturon kaj limigos la afiksojn al taŭga uzo, precize kiel la knabeto kun nova, akra tranĉilo, post difekto de meblo, fingroj, kaj kio ajn, iom post iom lernas ĝian lertan kaj zorgan uzon.

La DEKA UNIVERSALA KONGRESO
Generalaj Informoj

DATO: De la 2a ĝis la 10a de Aŭgusto, 1914.

Kotizoj: Sm. 10.; por familianoj, Sm. 8.

Ordinara Adreso: 3 Place Jussieu, Paris, France.

Bankoj: Societe Generale, 15 Blvd. Montmartre, Paris; Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London, S. W., England.

Tuj post la ricevo de la kotizajo, la Kongresa Komitato sendos provizoran karton al la nova kongresano. Se ĉi tiu ne ricevos siatempe sian provizoran karton, li estas petata sciigi tion al la Komitato.

Por eviti poŝtajn elspezojn, la Komitato respondos al ĉiuj neurĝaj demandoj pere de la kongresa gazeto.

Ĉiuj pagoj al la kongreso devos esti faritaj en frankoj (franca mono).

La nombro de la kongresanoj je la 25a de Aprilo estas 1,856.

La kongresa insigno konsistas el bronza plaketo, kiu prezentos la panoramon de Parizo desegnititan de S-ro Agache. Apud la malsupra rando troviĝos la vortoj "Deka Kongreso de Esperanto" kaj sur la supro de la plaketo "Parizo 1914." La insigno pendos de rubanda banto, kies koloro estas verda por la nefrancaj kongresanoj, blu-blank-ruĝa por la francaj, blu-ruĝa por la Parizanoj, laŭ la naciaj aŭ urbaj koloroj. Kvankam ili ne havos la trikoloran banton, la Pa-

rizanoj estas tamen francoj, kaj france parolas.

(Elĉerpajoj el la "Gazeto por la Deka Kongreso").

DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Paris — 2-10 Aŭgusto, 1914 — Paris
3, Place Jussieu, Paris

Mi subskribint (in)o deziras aliĝi al la **Deka Universala Kongreso de Esperanto** kaj por tio mi pagas la sekvantajn kotizojn:

1 Kongresa KartoFr. 25.—
Suplementa(j) Karto(j) po
Fr. 10Fr.....

Mi sendas ĉi-kune per.....

la sumon de.....Fr.....

al la **Deka Kongreso de Esperanto..**
3, Place Jussieu, Paris

Familia nomo (S-ro, S-ino, F-ino)

.....

Persona antaŭ- aŭ bapt-nomo

.....

Profesio

Nacieco

Strato kaj numero

Urbo

Provinco

Lando

Kune venas familianoj, kies nomoj estas:

(S-ro, S-ino, F-ino)

(S-ro, S-ino, F-ino)

(S-ro, S-ino, F-ino)

Dato: 1914

Subskribo

La raporto ke la Ŝoŝonaj Indianoj forlasis tribajn dancojn por la tango estas interesa, sed kio efektive pravas ke civilizacio enradikiĝas estas la

aserto ke unu el la indianaj fraŭlinoj donas lecionojn en la nova danco je profitdona prezo.

Trad. J.M.C.Jr.

ANOTHER CALL FOR HELP!

Mr. A. S. Mellichamp of Agricola, Miss., requests us to notify all Mississippi Esperantists, past, present or future, that he would like to hear from them relative to forming plans for a good strong organization in this state. It's up to you Mississippians now — how about putting your state on the map? Write to Mr. Mellichamp—In union there is strength.

Prof. Rene Maurice Frechet of the University of Poitiers, will conduct a mathematical course (Lectures on General Analysis) at the University of Illinois, Urbana, Ill., during the term 1914-1915. As president of the Esperanto Group in Poitiers, France, he will be happy to meet all American Esperantists possible. He will arrive with his family the 31st of August, 1914, in New York, where he will remain for two days, then stopping in Niagara Falls one day and Chicago two days. He will be glad to hear from our readers, and may be addressed at Faculte de Science, Poitiers (Vienne) France.

INDIVIDUECO

Nia vivo malfaldiĝas
De interne, kiel floro;
Malrapide ĝi fariĝas
En kvalito laŭ la koro.

Laŭ la semo, la kreskajo;
Laŭ la fonto, la rivero;
Laŭ deveno, la estajo—
Tia ĉies karaktero.

Laŭ la arbo frukto estas;
Laŭ la homo, la vivado;
Laŭ animo ĉiu restas,
Pro regulo de l' estado.

J. Lekberg

RAKONTETO

Foje kune laboris en ŝtonegejo du viroj nomitaj Hennessey kaj Murphy. Okazis ke post eksplodego

Hennessey malaperis kaj post kvar semajnoj Murphy faris same. Murphy alvenis en ĉielon sed post multe da serĉado ne povis trovi Hennessey. Li demandis al la pordgardisto pri sia amiko sed ne povis eĉ trovi lian nomon sur la libro. La gardisto proponis ke Murphy uzu la telefonon al la alia loko kaj li tuj faris tion, trovante ke S-ro Hennessey tie estas. Oni alvokis Hennessey kaj la sekvan-ta parolado okazis:

Hennessey — Kiu estas?

Murphy — Murphy de la ŝtonegejo.

H. — Kie vi estas?

M. — En Ĉielo.

H. — Kiel vi ŝatas la lokon?

M. — Bone, kaj vi?

H. — Bonege, mi laboras nur kvar horojn ĉiutage.

M. — Kvar horojn! Mi laboras dek ses kaj eble laboros dudek baldaŭ.

H. — Kial vi laboras tiel longe?

M. — Ni ne havas sufiĉe da helpantoj.

Tradukis,

F. W. W.

LERTA SERPENTO

Ĉe la vilaĝa butiko la vespera bablado sin turnis al serpentoj. Oni rakontis la kutimajn fabelojn pri nestegoj de reptiloj elfositaj el la tero; pri ringegaj serpentoj enbuŝigante la voston kaj malsuprenrulante sur la montetoj, k.t.p. Sed onklo Henrio ĉiam silentis kun ŝajno de tolerema supereco sur la vizaĝo. "Ĉu vi neniam havis spertojn kun serpentoj, onklo?" oni demandis.

"Nu, stranga afero okazis ĉe mi antaŭ tridek jaroj," respondis onklo Henrio. "Okazis ke la pastro neatendite vizitis nin, kaj Sary Ann devigis min mortigi la lastan kokon kiun ni posedis. Dum ĝi konvulsie baraktis, laŭ la maniero de senkapigitaj kokoj, aperis pesta artika serpento. Mi tuj rompemis ĝin je ĉiu artikulo kaj, ĉar oni diras ke la pecoj rekunkreskos kaj la serpento viviĝos, mi enmetis la kapon en la fornon. Dum la tagmanĝo kiun ĉiuj multe ĝuadis, aŭdiĝis krio de koko en la birdkorto. 'Kio estas,' ekkriis Sary Ann, 'mi scias ke nia sola koko kuŝas sur la tablo kaj ne plu povas krii.' La pastro kaj mi rapidis en la birdkorton kaj survoje ree aŭdis raŭkan krion. Nu, kiam oni pripensas la aferon ĝi ne estas tiel stranga. La artikuloj de tiu serpento reartikiĝis

kaj ĉar mankis la forbrulita kapo ĝi alprenis la kapon de la koko kiu apude kuŝis."

Estis momento de silento en la bu-

tiko kaj kiam la konversacio rekomenciĝis, serpentoj ne estis la temo.

El la angla tradukis,
F-ino Mattie Wadsworth

SUR NIA TABLO

THE ESPERANTO MONTHLY, Jan. kaj Feb. 1914. Ĉi tiuj du numeroj estas la komenco de la dua jaro de gazeto kiu tenas unikan lokon inter la esperantaj eldonaĵoj por angleparolantaj studentoj. Ĝia rolo estas precipe instrua, kaj ĝi pritraktas temojn por kiuj ne estas spaco en la esence propagandaj gazetoj. Krom serio da lecionoj, ĝi estas ankaŭ forumo por la diskutado de kelkaj el la pli delikataj punktoj de Esperanto,—ĉu estas pli bone "estonte," ĉu "en la estonteco," ĉu "en estonta tempo;" ĉu pli bone estas "dektri," ĉu "dek tri," k.t.p. Krom tio, estas simpla ekzerco, mallongaj artikoloj, kaj sugestioj por lernado kaj memorigo. Unu el la pli gravaj fakoj estas "Uncle Bill's Corner," kio en la Februara numero tre klare elmontras la elparolon de la vokaloj, kaj provas forigi la era-

ran elparolon de "e,"—gravan pekon de la unuaj anglaj lernolibroj,—ankaŭ avertas pri la angla emo duobligi la sonon de simplaj vokaloj.

Zorga tralegado de specimena numero rezultos per profito al la leganto kaj al la eldonisto; ĉar, traleginte unu numeron, la studento ne estos kontenta, ĝis kiam li pli intime konatiĝos kun ĉi tiu bonega gazeto.

KATOLIKA ESPERO, Marto 1914. Estas bedaŭrinda la apero en ĉi tiu grava gazeto de letero de Liverpoola Pastro, "La Kikuju-Disputado en la Anglikana Eklezio." Tia atako kontraŭ iu Eklezio ne estas inda je Kristano, nek je Esperantisto, nek estas diplomata. K. E. ellasante tian artikolon en ĝian enhavon, pekas kontraŭ la tolereman spiriton, kiu estas la fundamento de Esperantismo.

KIAL SI OFENDIGIS?

Jam estas dek jaroj de kiam ni, t.e. mi kaj edzino mia, vizitas dum novjara festo gesinjorojn Borisov. Do tial ni decidis iri al ili ankaŭ morgaŭ. Utiligante kaŭzon, mia edzino elpetis de mi aĉeton de l' roboj. Mi estas bonkora edzo kaj mi aĉetis eĉ du robojn: violan kaj flavan.

Jen novjaro. Mia edzino diris:

—Mi ne scias, kian robon vesti.

—Kian volas.

—Mi ne scias, kian mi volas.

Mi ekridis.

—Konsilu al mi.

—La violan.

—Kial violan, sed ne flavan?

—Vestu flavan,—mi rapide konsentis.

—Kial flavan?

—Do tial.

—Kompreneble, por vi tute egale: la edzino povas sin vesti eĉ per mato. Se vi havus amulinon, tiam vi sciis kiel konsili.

—Sed kial vi scias, ke mi ne havas amulinon?—kun serioza mieno demandis mi.

—Si konsterniĝis kaj levis la ŝultrojn.

—Ĉe mi estas tri amulinoj,—diris mi.

Tiuj ĉi vortoj revenigis ŝian konscion.

—Violan aŭ flavan?

—Violan.

—Sed vi ja ĵus konsilis la flavan.

—Mi ŝanĝis mian decidon.

—Kial?

—La viola pli bone trafas por via vizaĝo.

—Nu, kaj flava?

—Ankaŭ, sed ĝi malmulte paligas.

—Ho, tiam pli bone.
 —Tial vestu la flavan.
 —Sed vi diris ke ĝi paligas.
 —Kaj vi trovis, ke ĉi tia okazo estas bona.

Mi ekspiris kaj sidiĝis. Ni iom silentis.

—Jam estas tempo iri, diris mi, frapante la kovrilojn de l' horloĝo.

—Mi estas jam de longe preta. Nur bezonas decidi: kian robon mi vestu.

—Jen kio: vestu frue la violan, poste la flavan, kaj tiam mi konsilos.

Mia propono al ŝi plaĉis. Ŝi prenis la violan kaj...diris:

—Eble mi frue vestu prove la flavan?

—Sed estas tute egale.

—Ho, tute ne! Dua impresio povas forgesigi unuan.

Mi sentis, ke mia pacienco malaperas, kiel la glaciaĵo sub sunaj radioj.

—Kara mia, mi havas tre bonan memoron, min ne venkas la impresoj kaj, se mi estos malobjektiva, tiam nur por deziro vidi vin en tia robo, en kia via beleco gajnas.

—Mi pensas, ke estas necese ĉiun robon vesti prove dufoje.

—Bonege, estu tiel, sed, mi petas, kiel eble plej rapide, do estas malfrue.

Ŝi vestis la violan.

—Nu kiel?

—Bonege, eĉ tre bonege.... Vi similas je Ĝiokondo (mi malprave flatis: ŝi tiom similis je Ĝiokondo, kiom mi je Leonardo-da-Vinĉi).

Ŝi kontente ridetis kaj turniĝis antaŭ spegulo.

—Restu en ĉi tiu robo. Vi nun estas tiel bela, kiel neĥiam.

Ŝi levis sian manon al miaj lipoj, mi kisis, sed....ŝi komencis vesti la flavan robon.

—Mi reprenas miajn antaŭajn vortojn: ĉi tiu robo farigas vin ankoraŭ plu interesa.—nun vi similas je unu el graciaj de Rubens.

Mi rapide prenis la violan robon por ĝin kaŝi en ŝranko.

—Ho, haltu, haltu! Al mi pli plaĉas esti simila je Ĝiokondo. Ĝiokondon ĉiu konas, kaj ĉiu rimarkos, ke inter Ĝiokondo kaj mi estas simileco. Donu la violan.

—Wilde ĉiam sintenis nee al virino, portanta violan robon.

—Li nee, sed mi jese.

Mi decidis, ke jam estas tempo por fini la aferon kaj tial mi diris:

—Jes, la viola estas tre originala,—vestu ĝin! Se post dek minutoj vi ne estos preta,— ni restos dome.

Vestante la violan, ŝi diris:
 —Kiel vi volas, tiel vi pensu, sed en flava koloro estas ia rilato al suno.... kaj ankaŭ io el Wilde....

Mi ekkoleris kaj demandis:
 —Ĉu vi konas fabelon pri la azeno de Buridano?

—Kompreneble mi ne konas! Pri iuj azenoj....

—Buridano konfirmas, ke la azeno, antaŭ kies buŝo troviĝas je egala distanco du faskoj de l' fojno, pli rapide mortos, ol decidos kiun faskon formangi.

Dio mia! Kiel ŝi ofendiĝis kaj histerie ploris.

Sed mi ŝin ne trankviligis: iri al gesinjoroj Borisov jam estis tro malfrue....Jam estis nokto.

Kolegoj je malfeliĉo, sinjoroj edzoj, ne aĉetu samtempe du robojn. Tri, kvar, ses, dek, se vi volas, sed ne du!

El "Suno de Ruslando" tradukis
 M. A. Buivid
 Riga, Rusujo

PRI GRAVITADO

Kiu estis la unua homo kiu meditis pri la kialo ke ĉiu nesubtenata objekto falas al la tero, la historiskribantoj de la filozofio ne klarigas al ni. Eble estis iu sovaĝulo el la pleistocenaĵoj, antaŭ duono da miliono da jaroj, kiu posedis cerbon iomete pli bone provizitan je griza materio ol siaj samtempuloj. La lastaj tute ne pensis pri la afero, sed la prognata praŝiokonto sendube alvenis al la genia konkludo ke la korpoj falas tial ke ili estas pezaj. Kompreneble tio klarigis la aferon nur per aliaj vortoj samsignifaj; sed la granda plimulto da homoj, eĉ en tiuj ĉi klerigitaj tempoj, kontentigas sin per vortoj anstataŭ ideoj, kaj la posteuloj de la primitiva pensanto en miloj da jarcentoj ne plibonigis lian klarigon.

Kredeble al pensantoj antaŭ Newton venis la ideo ke korpoj falas tial ke la tero altiris ilin, sed tiu granda matematikisto estis la unua kiu komprenis la temon per ĝia tuteco kaj metis ĝin sur nesubebla bazo de simpla matematiko.

Ni tute ne scias kial du korpoj emas movi unu al la alia per gravitado. Newton mem jam trovis neimagebla la ideon de agado tra malplena spaco.

Oni povas peni klarigi gravitadon kiel ion transsendatan de eteraj ondoj kaŭzataj de vibrado de la atomoj de korpoj, aŭ li povas klarigi ĝin per iu ajn alia modo kiun li ŝatas; sed per tio li nur klarigas nekonatan efikon per egale nekonata kaŭzo. Efektive oni rajtas diri nur ke du korpoj agas unu al la alia tiel kiel ili agus se ili altirus sin reciproke laŭ la Newtonaj leĝoj.

Nuntempe ĉiu scias ke du korpoj altiras unu la alian per forto rekte proporcia je iliaj masoj kaj inverse proporcia je la kvadrato de ilia distanco. Krom tio, multaj homoj ŝajnas teni iom nebulajn ideojn pri la temo. Pli korekte la esprimado devus esti: Ĉiu peceto de materio en la universo altiras ĉiun alian peceton laŭ la diritaj leĝoj.

Foje mi aŭdis pastron, en prediko pri la povo kaj saĝeco de la Kreinto, diri ke Dio estus povinta agigi la gravitadon laŭ la kubo aŭ la kvara potenco de la distanco. Tio al mi ŝajnis same kiel diri ke Dio povus kaŭzi ke du kaj du egalu kvin aŭ ses. Tiu kiu komprenas la leĝon de gravitado ne povus imagi kiel ĝi povus kondukti laŭ alia leĝo, same kiel li ne povus kompreni kiamaniere du kaj du povus esti alia ol kvar. La kialo estas facile komprenebla. La gravitado de iu ajn korpo agas kvazaŭ ĝi elirus el punkto ĉe la centro de ĝia maso. Ekzemple, la tuta altiranta forto de la terglobo estas kvazaŭ kuncentrigita ĉe ĝia centra punkto. Nu ni imagu ke de tiu centra punkto sennombreblaj linioj aŭ radioj egale kaj unuforme dispartigitaj eliras en ĉiun direkton kaj ĝisiras kvazaŭ al la fino de la universo. Ĉiu el tiuj ĉi rektaj radioj kompreneble estos perpendikulara je la tera surfaco. Sur la surfaco de la tero ni metas kvadratan platon kiu pezas unu funton. Ni supozu ke tra tiu ĉi plato trairas cento de la altirantaj radioj. Do ni supozu ke la plato estu formovita 3913 mejlojn super la tero, tio estas, dufoje pli mal-

proksime de la tera centro. La tuta fasko da radioj estas nun disigita ĝuste tiom ke ĝi okupas spacon kvarope pli granda ol sur la tera surfaco, laŭ simpla geometria regulo. Nemaniere ĝi povus kovri spacon naŭfoje aŭ dek sesfoje pli grandan, kiel la suprediritaj vortoj de la bona pastro sugestius. La plato nun kovros nur kvarono de la cent radioj, tio estas, ĝi estas altirata de nur kvarono de la radioj, kaj ĝi pezas kvaronon da funto. Se, tenante sian dikecon, ĝi estus pligrandigita tiom ke ĝi kovrus la cent radiojn, ĝi pezus ankoraŭ unu funton. Se ĝi estus formovita senĉese, pligrandigante samtempe tiamaniere ke ĝi kovrus la tutajn cent radiojn, kaj kompreneble konservante la saman dikecon, la tero ankoraŭ altirus ĝin per forto de unu funto eĉ se ĝi ĝisiras ĝis la finoj de la universo, milionojn da lumjaroj for.

Tiu ĉi maniero por trakti la temon estas uzata nur por montri la principon kaj la neeviteblecon de la leĝo de inversaj kvadratoj. Kompreneble gravitado ne agas per realaj linioj.

Kiam oni provas levi tunon da fero per la manoj, li emas pensi ke la forto de gravitado estas iom granda. Li forgesas ke la maso da fero estas altirata de la tuta tero, tio estas, de maso da materio kies pezo, se oni povus pesi ĝin same kiel oni pesas la feron, estus pli ol ses sekstilionoj da tunoj. Magneto altiras feran najlon per forto multe milionoble pli granda ol ilia gravitado. Du masoj pezantaj po 416,000 tunoj unu mejlon disaj altirus sin reciproke per forto de nur unu funto.

Du masoj, ĉiu el ili pezanta unu funton, disitaj unu mejlon en malplena spaco, komencus movi unu al la alia. Kiom rapide? Tre malrapide. Pli malrapide eĉ ol knabsendito preterpasanta kampon kie basbalo estas ludata. Ili kunvenus nur post multaj milionoj da jaroj.

Robert M. Bailey

? ? ? ?

We are asked for the translation of the following:

Peanut: arahiso—**Grapefruit:** pomelo (a new word, which will probably be officialized)—**Some friends of mine:** kelkaj amikoj miaj—**To have a fine time:** bonege amuzi sin—**He predeceased the testator:** li mortis pli frue ol la testamentinto.

What is the best translation for "he walked one and a half miles," also "he paid two and a quarter dollars?"

The English here is an abbreviated way of saying, "one mile and a half (of a mile)," the words in parentheses being subject to omission in either English or Esperanto. Hence, *li marŝis mejlon kaj duonon (da mejloj)* is correct for the first sentence, and *li pagis du dolarojn kaj kvaronon (da dolaro)* for the second. The word-order as here given is the preferable one.

Is elision desirable or not? I find that some authors use it frequently, and others not at all.

Dr. Zamenhof states in rule 16 that the final vowel of the substantive and of the article can be dropped. But in that very rule he could have illustrated it twice by using *de l'*, and he used *de la*. This gives us a hint, and it will generally be better to avoid elision except in poetry. The French writers are prone to use elision abundantly, because they have the habit from their own language, and Italians do also. But Americans could be accused of posing or of imitating gallicisms if they experiment with this, and it is wiser not to elide in prose writing or ordinary conversation. The less elision the clearer the language.

Aside from verbs like *pluvas*, *neĝas*, etc., just when can the subject of a verb be left out properly?

The subject need not be repeated with two closely connected verbs, as in *li venis kaj anoncis la aferon*, or similar instances. But to omit the subject of an independent verb (except in the imperative) is generally objectionable. The danger arises when the subject is "it," which a person may confuse with the untranslated "grammatical subject" in such sentences as "it is hard to believe what one hears," where the **clause** is the true or logical subject. For example, the following sentences are **incomplete**, and the verb *esti* needs an expressed subject such as *ĝi*, *tio*, *tiu*, etc., according to the context: *Estas belega urbeto. Vidu la portreton; estas mia patro. Tiam okazis tertremo; estis neforgesebla. Ĉu vi legis ĝin? Estas bona gazeto.*

What is the difference in actual use between *super* and *supre*, since both mean "above?"

Super is the preposition, which must therefore always have a noun or pronoun as its complement, and must never be left "up in the air" without such complement. *Supre* is the adverb, which must be used when the phrase contains no such complement for the word

to govern. For example, *La birdo flugis super la arboj; la nuboj super niaj kapoj estas bluaj; la aero ĉirkaŭ ni estas malpli pura ol la aero supre; Nia urbo troviĝas super la nivelo de la maro. Li supren kuris la ŝtuparon kaj paŭzis supre kliniĝante super la balustrado.* The use of *supre* in combination with a prepositional phrase is of course allowable, as, *Ne rimarkinte la ŝtuparon, li falis de supre ĝis malsupre.*

Why must we use *Oni diras*, instead of *Mi estas dirata*, for I am told? The latter is certainly a more literal translation.

It is a more literal translation of the mere words, but certainly not of the meaning. It is not *you* which is "told," but a fact, story, or item, and you are the hearer, not the matter related. English is idiomatic in this respect, using what seem to be real passives where the meaning is not truly a passive one. So also, "I am permitted to state," means that permission has been given to you to state the matter; therefore the accurate Esperanto translation of this (and its opposite) should be of the real meaning, thus: *Estas permesate ke mi diru*, also, *Estas malpermesate ke oni eniru*, etc.

Are *spite* and *escepte* to be used directly with nouns, or not?

The word *escepte* is clearly an adverb, therefore it can not be used except with a prepositional phrase, as "*Mi ricevis nenion escepte de tio, Mi ne skribis ĝin escepte sur tiu papero, Vi ne trovos ĝin escepte en tiu skatolo.*" The word *spite* is as yet unsettled, for although it has the adverbial form, and is so used, as *Spite al vi*, from the general root *spit-i*, nevertheless it has also been generally used as a preposition, as *spite ĉio, mi iros, spite ĉiuj liaj argumentoj*, etc. Probably the adverbial use will in time be settled upon as the preferable one, owing to the form of the word.

"MI REKOMPENCOS"

Originala novelo de John L. Stanyan
(Speciale verkita por Amerika Esperantisto)

Ĉapitro VIII

Monatoj forpasis. Sinjorino Dekster kaj ŝia filino malaperis kvazaŭ en-glutigitaj en la teron. La ĝenerala opinio pri la Kenriĝ'a afero estis, ke lia edzino pafis lin dum ŝi kaj la patrino estis forkurantaj.

Post kiam Kenriĝ estis korpe resanigita li restis frenezulo, kaj konstante oni gardis lin kontraŭ ebla

memmortigo. Iam li sidis multajn tagojn tute silenta—versajne senviva. Tiaj okazoj sekvantiĝis de teruraj kriegoj kaj petegoj pri la perdita edzino. Li ofte havis emon atente rigardi sian senmanhavan brakon, kaj poste li ploregadis plej kortuŝe.

"Mario! Mario! Mario ĝin forpafis! Pro kio ŝi ne revenas al mi? Mi ŝin tute pardonos! Ŝi forpafis mian ma-

non en la tago kiam ŝi legis tiun malbenitan leteron. Kompatinda knabino! Tiu mano plu ne skribos pri amo al tiu virindiablo—tiu fratino de Hamleto. Hamleto estas freneza; ankaŭ Louisino kaj Ofelio—ĉiuj el ili estas frenezaj! Mi mem estas freneza—freneza! Malgraŭ tio, mi amegas Mario'n—dolĉa Mario! Mia kapo ne tiel dolorigus min se ŝi revenus al mi! Pro kio ŝi ne revenas al mi?

Tiaj estis liaj frenezajoj dum kelkaj monatoj.

Iun tagon, oni faris konsiladon de aro da famaj kuracistoj, famaj pro ilia scio pri cerbo-malsaneco. Ĉe la fino de l' konsilado, oni konkludis, ke estus bona eksperimento iel trovi Mario'n, kaj sciigi al ŝi, ke la resaniĝo de ŝia edzo tute dependas sur ŝia volo—ĉu ŝi refoje renkontos lin?

Sekve de tiu konkludo, oni enpresigis en kelkajn bonkonitajn jurnalajn la jenan anoncon:

“M. K. Georgo estas tre malsana. Via alesto—eĉ dum kvin minutoj—sendube rehavigos al li lian racipovon. La pleja sekreteco estos donata al la afero, se vi tion dezirus. Ĉu vi savos vian edzon je la frenezulejo? Venu al la domo iun nokton, post la dekdua.”

Iun helan vesperon Georgo sidis en brakseĝo pli komforta ol dum kelka tempo. La zorganto estis apud li. Ĉirkaŭ la meznokto la malsanulo fariĝis pli racia.

“Ho, amiko,” li patose diris, “se ŝi nur revenus al mi, mi estas certa, ke mi tute resaniĝos, korpe kaj cerbe. Mi ne estas freneza la tutan tempon—ĉu mi eraras? Ho, Mario kaj mi estis tiel feliĉaj en ĉi tiu ĉambro. Mi sidis en tiu seĝo—ŝi en tiu ĉi—kaj mi legis al ŝi iujn el miaj verkitaĵoj, kaj kvankam verŝajne ŝi ne entute komprenis, ni estis feliĉaj. Tiu tempe mi havis du manojn!”

Li fariĝis kvazaŭ duonkonscia, kaj senĉese alrigardis la spegulon kiun li malpermesis iĝi riparata. La truo en la portreto ankoraŭ vidiĝas.

Servisto eniris la ĉambron, kaj murmuretis ion en la oreilon de la kuracisto. “Bone,” li subvoĉe respondis, “mi estos tie baldaŭ.” La servisto malaperis. La kuracisto alproksimiĝis Kenriĝ'on.

“Mia amiko,” li simpatieme ekdiris, “via edzino estis tre kara al vi, kaj tial vi ambaŭ estis feliĉaj. Nun, kuraciĝu, Sinjoro Kenriĝ. Eble vi ŝin vidos.”

Kenriĝ salte leviĝis. “Vidi ŝin denove—vidi Mario'n? Vidi ŝian dolĉplenan vizaĝon? Volonte mi mortus, se mi povus ŝin denove vidi. Mi estas certa, ke ŝi pardonos min pro mia malbenita letero al Ofelio. Ofelio estis morta—estas tute egale al mi nun!”

“Sinjoro Kenriĝ, vi pli bone fartas nuntempe—ĉu ne?” demandis la kuracisto.

“Jes, Jes!” li rapide elpuŝis. “Multe pli bone. Mia koro funkciis tre bone hodiaŭ—tre bone, kiam mi memoris ke ĝi estas disrumpita. Alie estas pri mia cerbo—mia kapo. Io malbona okazas en ĝi.”

“Jes,” diris la kuracisto, “vere vi havas multon pro kio vi devas esti esperema. Nun mi iros al la kuirejo por alporti al vi vian manĝon. Poste vi enlitiĝos. Morgaŭ vi fartos eĉ pli bone ol hodiaŭ,” kaj dolĉa rideto vidiĝis sur lia vizaĝo.

Post nemultaj momentoj Kenriĝ piedstaris, kaj marŝis ĉirkaŭe en la ĉambro, per fingroj tuŝante kaj per lipoj kizante la objektojn kiuj antaŭe apartenis al Mario, la idolo de lia koro. Li hazarde haltis ĝuste antaŭ la rompita spegulo. Pli supre en ĝi estis sufiĉe da spaco por rebriligi lian vizaĝon. Baldaŭ varmaj larmoj plenigis liajn okulojn; li parolis, petegis, preĝis al Mario, kiu—laŭ lia imago—staris en la spegulo. Ambaŭ brakojn, sed nur unu manon li etendis al la spegulo, dum li ploreme petegis, ke ŝi revenu al li.

En ĝuste tiu momento, mallaŭte la pordo malfermiĝis, kaj virino enpaŝis en la ĉambron. Tiu estis Mario. Oni estis dirinta al ŝi, ke estus bone se ŝi ne tro subite vidiĝus antaŭ la okuloj de ŝia edzo.

Dum ŝi eniris ŝi ne povis vidi linton, ĉar la portreto staris inter ŝi kaj la spegulo. Pro sia korpremo ŝi maldolĉe eklarmis. Jen la portreto kun la granda malbela truo en ĝi. Alproksimiĝante la portreton ŝi pasis rekte trans la linio de l' reflekto de la spegulo.

Tra siaj perlecaj larmoj Kenriĝ ekvidis en la ne disrumpita peceto de la spegulo, la dolĉan vizaĝon de Mario.

Rigide, senspirpove unu momenton li staris kvazaŭ li vidas fantomon. Tiam, iom post iom, li sin turnis. Li eljetis ĝojegan kriegon, kaj malrapide ekpaŝis al ŝi, subite timante ĉu li ne forflugigos la fantomon kiu staras antaŭ li, aŭ ĉu li sin ne vekos el tiu ĉi kvazaŭa sonĝo.

Mario staris tute senmova. Laŭ la konsilajoj de la kuracisto, ŝi ne volis unue ekparoli.

Alproksimiĝinte Mario'n, ankoraŭ rigardante en la al li plej belajn vizaĝ-trajtojn en la mondo, Kenriĝ malrapide genufleksis sur la tapiŝon. Delikate, kareseme li ekprenis la malsupraĵon de ŝia jupo kaj ĝin kisis kelkfoje.

Levante la okulojn al la ŝiaj, tremlike li murmuris, "Mario! Mario mia—ĉu mi sonĝas? Ĉu verdire estas vi?"

Preninte lian solan manon, ŝi amin-

de suprentiris lin ĝis kiam ili staris vizaĝon ĉe vizaĝo.

"Georgo," dolĉe diris ŝi, "vi ja ne sonĝas; do estas mi. Vi estas malsana; mi kisu vian kapon tiel ke la doloroj tuj ekmalaperos."

Ili kune sidis en granda brakseĝo kaj reciproke silentis dum kelka tempo, lia kapo ripozanta sur ŝia brusto.

Kvazaŭ igitte de iu feino kompatema, iliaj lipoj kuniĝis.

La du animoj denove fariĝis unu.

La Fino



BUY BOOKS WITH A

COUPON TICKET

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS.



“KIU ESTAS TIU, EN MIA BOMBONKAMPO, MIAJN BOMBONOJN STELANTA?”

El “PRINCO VANC’ ” Tradukita de Herbert Harris.

Rekomendita de E. L. A.

Ilustrita.

35 Cendoj; Tolbindita, 75 Cendoj.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS., USONO

TENTH CONGRESS OF ESPERANTISTS

Will be held in
PARIS, AUGUST 2 TO 8

This will be the greatest gathering of Esperantists ever held, and, in order to secure a large attendance of Americans, special inducements will be offered by the

NORTH GERMAN LLOYD

Express and Fast Mail steamers on Tuesdays, Thursdays and Saturdays to

LONDON PARIS BREMEN

You can return, if you prefer, by way of the Mediterranean, sailing from Genoa or Naples.

For detailed information address

DELRICHS & CO., Gen. Agts.
5 Broadway, N. Y.
Or Local Agents

The
Key to
Europe



LA ESPERO

Words and music of the Esperanto National Anthem, according to the well-known and popular air of De Menil.

25 copies for 25c
100 copies for 50c

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.
West Newton, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40 literojn, punktojn aŭ spacojn.]

S-RO PAUL M. SCHUYLER,
Big Rapids, Mich., deziras interŝanĝi P.K. kun gekongresanoj de la Sepa E.A.N.A. Kongreso.

F-INO ELMA STOCKINGER,
Versailles, Ind., Usono, kun fremdu-
loj pri socialistaj temoj. 6

The 1914 Edition OF The Whole of Esperanto

Owing to the tremendous demand for this propaganda booklet we have been obliged to print another edition.

5c per copy 10 for 25c 50 for \$1.00

Grammar, Vocabularies and a Little
Story

Have You a Copy?

—
THE
AMERICAN ESPERANTIST CO.
Incorporated
West Newton, Mass.

THE ESPERANTO MONTHLY

An excellent elementary magazine for English-speaking Esperantists.

Specially adapted to beginners and class leaders.

One year's subscription at the nominal price of **FORTY CENTS!**

Special combination offer with Amerika Esperantisto for a limited time,—\$1.25.

—
THE
AMERICAN ESPERANTIST CO.
Incorporated
West Newton, Mass.

When writing to advertisers please mention AMERIKA ESPERANTISTO

Pass judgment
on them all—
You will then
decide on the

Emerson **PLAYER-PIANO**

Send for Catalog

Dealers in principal
cities and towns

Emerson Piano Co.

Boston, Mass.